



Novembro 1952a N-ro 2

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Giro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

AL LA GESAMIDEANOJ EN LA TUTA MONDO.

Milito minacas la mondon kaj la potencoj frenezas fabriki atombombon. Nun ni prezentas esperantan tradukon de „Infanoj de la Atombombo“ al vi kaj viaj landanoj.

„Infanoj de la Atombombo“ estas kolekto de verkoj, skribitaj de infanoj travivintaj la atombombadon, kiu aŭ vundis ilin, aŭ rabis de ili iliajn gepatrojn aŭ gefratojn, aŭ brulis iliajn domojn. Ĉiun paĝon plenigas ilia aspiro al paco kaj malamo kontraŭ la milito.

Gesamideanoj en la mondo! Bonvolu traduki tiun ĉi verkon en vian lingvon kaj prezenti al viaj landanoj per ĵurnalo, gazeto aŭ organo de via grupo.

Via japana amiko, Mitsuo Makino.

(Esp. Rondo de Kumamoto Universitato, Kurokami-machi, Kumamoto-shi, Japanujo.)

EL „LA INFANOJ DE LA ATOMBOMBO“.

Mi ankoraŭ dormis en la lito, kiam la atombomba akcidento okazis je la 6-a de aŭgusto (1945-a). Surprizite de laŭta sonego mi vekigis kaj rimarkis, ke la ĉirkaŭaĵo estas mal-luma.

Mirigite mi sidiĝis kaj ĝuste en tiu momente tegoloj de la tegmento falis super mian kapon. Supozante, ke eble io grava okazis, mi tuj stariĝis kaj ekrigardis ĉirkaŭen. Oh! Tiam

mi jam ne trovis la tegmenton, nek la plafonon. Najbara onklino alproksimiĝis al mi kaj konsilis, ke mi fuĝu, alie mi brulmortos, kaj mi tuj kuris for.

Survoje ia maltrankvilo min haltigis. Venis en mian kapon la penso, ke mi ne estas kun la panjo.

„Mi devas sciigi tiun aferon al la panjo“, tiel mi pensis kaj returnen (daŭrigo sur la 2a paĝo)

daŭ renkonti la panjon!" mi diris al mi mem.

Foje mi eliris el la kavo de l'monteto. Jen la ĉielo estis malluma kaj domoj detruigis kaj tegoloj disiĝis.

De proksime kaj de malproksime mi aŭdis plorkriojn helpoj vokantaj.

Vunditoj, kies vizaĝoj estis deformitaj nerekoneble, kriadis por akvo.

Tiun vesperon mi devis nokti ĉe la monteto. La ŭrbo bruladis kaj sur la ĉielo staris la lumo ruĝa kiel paplanterno.

La sekvantan matenon mi iris al la loko, kie antaŭe staris mia domo.

Dum longa tempo mi staris tie kun espero, ke la panjo estas reveninta de prizorgo pri mi, sed mi ne povis ŝin trovi. Sur la strato Hunairihonĉo kuŝis homoj, apenaŭ vivantaj kaj aliaj jam mortintaj.

Esperante, ke la panjo estas inter ili, mi observis unu vizaĝon post alia, sed mi ŝin vane serĉis.

Pluen mi paŝadis kaj alvenis al la ponto Mejĝibaŝi, kie kuŝis nur homoj senvivaj. Ankaŭ tie ŝi ne estis. Mi venis al la riverbordo kaj plorante atendadis la panjon dum longa tempo, sed fine ŝi ne revenis al mi.

Sur la rivero sin balancadis homaj kadavroj laŭ la ondetoj.

De tiam jam pasis ses jaroj. Mi nun loĝas en la strato Macubaraĉo. Mi jam sufiĉe spertis abomenindan militon. Mi elkore deziras, ke la mondo eterne estu paca.

Nakasima Norio, unuajara klasano de liceo (tiam unuajara klasano de elementa lernejo), trad. de Hirano Masahiro.

BEOGRADO — UNU EL LA PLEJ INTERESAJ URBOJ DE EŬROPO.

Matene alvenas Orient-Ekspresavagonaro bruplenan stacidomon de jugoslavia ĉefurbo. Alveninto el okcidento tuj eksentas novan atmosferon. Ĉu post ununokta rapidega veturado trans senlima ebenaĵo oni jam atingis Orienton? Ankoraŭ ne, sed okcidenton oni forlasis. Ĉi tie estas Balkano!

Laŭ ĝenerala aspekto la urbo tamen ne malsimilas tro al aliaj urboj ie sur la mondo, nenion tro strangan oni povas vidi; larĝaj stratoj, modernaj kaj grandaj domoj, plenaj magazenoj, senlaĉa amaso sur rando de trafikplenaj urbarterioj - fakte tre vigle pulsanta koro de la lando.

Nuntempe Beogrado havas pli ol 300.000 enloĝantojn, multe pli ol an-

taŭ la milito kaj tial estas ege malfacile akiri loĝejon.

Fremdulo povas vidi multon novan en tiu urbo. Oni aŭdis pri la ruinoj, sed ekvidas novajn, modernegajn domojn, plilarĝigitajn stratojn kaj tute novan ordon en urba trafiko. Trans centra placo „Terazije" iam veturadis malnovaj kaj malgrandaj tramveturiloj kaj la placo mem estis tre mallarĝa kaj nepraktika - nun modernaj trolejbusoj trapasadas larĝan asfaltigitan placon.

Sed se oni forlasis la centron, la bildo ŝanĝiĝas. Oni preskaŭ povas perdiĝi en senlima reto de ŝtonigitaj kaj malpuraj stratetoj kaj venante al la rando de la urbo, oni kelkloke povas vidi kabanaĉojn, kiuj pli simi-

PARENTEZE.

Homoj

Kaj mi streĉis la orelojn: „Jes, tiuj Esperantistoj estas veraj stranguloj!”

Estis la interparolado inter du sinjoroj. Ĝiskreve koleriĝinta mi volis intermiksi min en la dialogon, sed pro malkuraĝeco daŭrigis mian vojon. Hejmenveninte mi ankoraŭ pripensis la diritaĵon kaj nevole komencis observi la al mi konatajn samideanojn. Pro la ebleco, ke ankaŭ vi, kara leganto, estas inter ili, mi ne citu nomojn

Estas la 55-jara fraŭlino, kiu jam, laŭ onidiroj, dum 30 jaroj persiste vizitas ĉiun klubkunvenon, dum kiuj ŝi parolas 4 vortojn (bonan vesperon-dufoje).

Estas la korespondemulo, kio havas laŭtakse du dekduojn da skribgeamikoj — prefere de ina sekso. Estas tradicio lia respondi post minimume 2 monatoj: ĉiu letero komenciĝas per: „Bonvolu pardoni” kaj finiĝas per: „Atendante vian baldaŭan respondon”

Kaj mi ne forgesu lin, kiu surprizatakas la geverdulojn per neamoncataj vizitoj. Ĉe mi li ĉiam dormas sur la divano, sub ĝi kuŝas, sindona, subskribinto

Mi observis la poŝtmark-, cigarruband- kaj alumetskatol-kolektantojn kaj poste miajn ne-esperantistajn konatojn.

Ah, se estas homoj, kiuj estas „strangaj” tiam ĉiuj homoj havas tiun econ, se oni akurate pristudas ilin. Tio estas almenaŭ la neŭtrala (!) konkludo de



(daŭrigo de la 1a paĝo)

iris sur la sama vojo. Mi trovis mian domon disfalinta. Pensante, ke la panjo eble estas ekster la domo, mi vokis ŝin, sed ne venis respondo. Kio okazis al ŝi?

Tiam venis najbara sinjorino kaj mi demandis al ŝi: „Ĉu vi do ne vidis mian panjon?”

„Mi ne rimarkis ŝin,” ŝi respondis.

Mi fariĝis malĝoja. Ne konata sinjoro preterpasanta parolis al mi: „Vi brulmortos, se vi ne fuĝos, do tuj foriru kun mi”.

Sed mi obstine serĉis la panjon.

Malgraŭ mia peno ŝi neniel troviĝis kaj mi ne sciis kion fari.

„Mi iel retrovos ŝin por vi morgaŭ matene, do fuĝu kun mi”. Diris la sinjoro denbe. Sed mi ne kuraĝis tuj respondi. Fine mi forkuris kun li, pro lia averto, ke tiuj mortos, kiuj ne tuj fuĝos. La sinjoro diris, ke estos jam sendanĝere, se oni alvenos al Eba. Ni alvenis al la kavono de l'monteto en Eba. Tie abunde fruktis tomatoj. Pro manko de akvo ĉiuj manĝis nur tomatojn.

„Oh, kiel forte mi deziras plej bal-

las al hundaj dometoj, ol al homaj loĝejoj. Sed ankaŭ alian panoramon oni povas ekvidi tie sur la rando. Oni detruis tiajn aĉajn kabanojn kaj elkonstruis tute novajn, belajn kaj sufiĉe modernajn domojn, kiuj blankas en verdaĵo de urba ĉirkaŭo. Multon oni faris jam post la milito por plibeligi la urbon kaj por doni al la loĝantoj pli agrablan vivon, sed tre multe oni ankoraŭ devos fari.

Kalemegdan estas malnova fortikaĵo sur monteto je kunfluo de riveroj Sava kaj Danubo. Nun ĉi tie estas parko, - inter grizaj muroj kaj turoj estas multe da verdaĵo kaj laŭ blankaj vojetoj promenas homoj, serĉante la trankvilecon, kiun oni ne povas trovi aliloke en la brua urbo. Jes, nun estas trankvile, sed se la ŝtonaj muroj ekparolus

En fortikaĵo estas akvejo, sur kiu estas surskribo farita de romanoj antaŭ pli ol mil jaroj. Antaŭ romanoj vivis ĉi tie keltaj gentoj kiuj batalis kontraŭ sudaj okupantoj. La romana imperio estis detruita kaj kiel ventego alvenis popoloj el nordorientaj direktoj, ili detruis la fortikaĵojn kaj denove elkonstruis ilin por defendi sin kontraŭ novaj alvenintoj ĉi tie estis ponto - ŝlosilo inter oriento kaj okcidento, inter sudo kaj nordo. Multfoje la malpuraj ondoj de kunfluigintaj riveroj estis kolorigitaj per sango.

Finfine venis slavoĵ kaj disvastigis preskaŭ trans la tutan Balkanon, trovinte novan patrujon kaj tuj ekbatalis por defendi ĝin.

En la jaro 1521a turkoj okupis Beogradon kaj de ĉi tie ektimigis la popolojn en preskaŭ tuta Meza-Eŭropo. Urbo kreskadis kaj estis detruita militoj, malsanoj, fajregoj regis en la urbo kaj terura okupanto skribadis la leĝojn al ribelema popolo, kiu sopiris nur por fini la mal-

luman turkan sklavecon. Komence de la 19a jarcento serboj unuafoje provis rompi la sklavajn katenojn kaj kvankam sensukcese, oni povis jam baldaŭ vidi, ke la terura forteco de istambula sultano ekmalgreskis

Dum la unua mondmilito la aŭstrogermana armeo apenaŭ post 14a atako sukcesis transiri la riverojn kaj eniri detruitan urbon. Dum la dua mondmilito, atakante Balkanon, Hitler denove detruis la urbon per bomboj. Kiam la homoj ankoraŭ ne sciis, ke la milito eksplodis, malamikaj aviadiloj jam ĵetadis la bombojn. Denove venis okupantoj trans detruitaj pontoj kaj volis regi laŭ sia maniero. Sed Beogrado ne estis trankvila, ĝiaj stratoj estis por la okupantoj same netraireblaj, kiel montaraj arbaroj en centra Bosnio. Batalante kontraŭ Hitlera-armeo ankaŭ anglo-usonaj bombiloj ne forgesis detruigi grandajn kvartalojn de la urbo. Kaj finfine novaj ruinoj kreskis okaze de liberigo de la urbo en la jaro 1944a.

Nun oni konstruas dum 6 jaroj kaj ruinoj preskaŭ ne plu estas troveblaj. Sed oni bone rigardu: ĉiu domo, ĉiu muro estas plena je truoj kaj truetoj de pafado. Ĉi tie ĉiu domo estis fortikaĵo kaj ĉiu homo devis esti soldato. La historio de Beogrado estas historio de bataloj, de detruado. Tion oni devas scii, rigardante la nunan jugoslavian ĉefurbon Tiu ĉi popolo neniam havis sufiĉe da tempo por ordigi sian urbon kaj vivmanieron, tro ofte ili devis prenadi la armilojn kaj denove konstrui la hejmojn.

Beogrado estas tre vigla urbo kaj plena de kontrastoj. Apud modernegaj domoj staras ankoraŭ domaĉoj el pasintaj jarcentoj, laŭ la samaj trafiklinioj veturadas tramveturiloj, aĉetitaj lastjare en eksterlando, apud tiuj, kiuj jam dum pli ol 50 jaroj estas „konuloj” de la beogradanoj. Oni

povas renkonti homon, kiu tute ne povas vivi sen plena komforto kaj alian, kiu sentas sin malagrade en moderna banejo kaj al kiu pli plaĉas pasigi la nokton en unike malpura stacidoma atendejo. Apud gastejetoj, kie la ciganoj muzikas al ĉarmaj kantistinoj, estas modernaj restoracioj, kie dum la tuta nokto krias modernega jazz-orkestro

Malfrue vespere forlasas „Orient-Express” Beogradon. Mi vidis jur-

naliston el iu okcidenta lando, kiu eksidinte en kupeo ankoraŭ ion skribis en notlibron. Jes, kiu vere volas ekkoni la vivon en tiu ĉi urbo, ricevas preskaŭ tro da impresoj kaj tro da novaĵoj. Sed tiaj ĵurnalistoj ne estas oftaj; kutime fremdaj ĵurnalistoj kaj aliaj turistoj sidas nur en luksega hotelo „Majestic” pensante, ke tio sufiĉas por ekkoni la urbon kaj la vivon sur Balkano.

-kd-

SUKCESA INTERNACIA KONFERENCO POR STUDENTOJ KAJ ALTLENEJANOJ.

Inter la 17. kaj 24 de aŭg. 1952 okazis en Schluchsee en Sudgermanujo la unua internacia konferenco por studentoj kaj altlernejanoj, kiu uzis esperanton.

Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejanoj iniciatis la konferencon kaj invitantoj estis Allgemeine Studentenausschuss der Universität Freiburg (Generala Studentkomitato de la universitato de Freiburg), Germana Esperanto-Junularo kaj Studenta Esperanto-Klubo en Freiburg. Ĉ. 20 delegitoj (de studentaj esperanto-organizaĵoj) el Danlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando, kaj Usono partoprenis. Jenaj temoj estis pritraktataj: La sociaj problemoj de la studentaro en diversaj landoj, internacia studenta kunlaborado kaj pri scienco kaj esperanto. Dum la konferenco fondiĝis „Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj” (IFESA) kiel prezidanto elektiĝis s-ro Johs. Vesterland Andersen, Danlando, kaj kiel honoran prezidanton oni elektis

universitatan profesoron G. Canuto, rektoro de Parma Universitato en Italujo.

Krom la temoj de la konferenco estis ampleksa kultura programo. Okaze de malfermo paroladis rektoro G. Canuto, kaj docento pri esperanto ĉe la amsterdama universitato, S. Pragano faris 2 prelegojn pri esperanta-literaturo. Profesoro G. Iggers, Little Rock, Usono, prelegis pri la stato de negraj studentoj en Usono, kaj s-ro Drago Kralj, Jugoslavujo, prelegis pri kulturaj problemoj en nuntempa Jugoslavujo. La konferenco ricevis konsiderindajn subvenciojn de Germana Ministrejo por Enlandaj Aferoj kaj de la franca kaj usona Altkomisarejoj. La dana delegacio krome ricevis subvenciojn de kopenhaga Universitato kaj la jugoslava delegito ricevis de la studenta Komitato en Ljubljana.

Oni decidis denove aranĝi konferencon en 1953; ĝi okazos en Ljubljana 1. - 8 aŭgusto.

ORGANIZAJ INFORMOJ:

Estraro: Felix Kat deklaris sin preta akcepti la funkcion de helpsekretario. Pro sia studo li ne plene povas sin okupi pri la tuta sekretaria tasko.

Asesoroj: Kvankam ni en la okt. nro promesis detale informi vin pri la taskoj asesoraj, ni bedaŭrinde ankoraŭ ne povas efektiviĝi tiun intencon.

Kurt Meyer akceptis la vojaĝservon, kiu por la membroj ekfunkcios la 1an de marto 1953a.

Perantoj: La brita perantino f-ino Rees sciigas la britajn membrojn, ke ŝi daŭre akceptas la kotizojn, sed rilate al ĉiuj aliaj flankoj de la movado oni sin turnu al sro B. O'Sullivan, 15 Homestead Close Shiregreen, Sheffield. Do, se vi havas proponojn por vigligi T.E.J.O.-n en Britio, bonvolu kontakti kun la nova helpanto.

Sron O'Sullivan ni kore bonvenigas en lia nova funkcio kaj deziras al li multan sukceson!

Kongreso: En la estrarkunveno, okazinta la 24an, 25an kaj 26an de oktobro, ni decidis akcepti la proponon de la Kufsteina Esperanto-grupo: ne okazigi la kongreson en Kufstein, sed en la apuda urbeto Wörgl, tre konata pro la ĉi-jara inaŭguro de la unua Zamenhof-monumento en Aŭstrio.

Gratulo: Annerose Adrion kaj Michel Schmidt ni kore gratulas pro ilia gefianĉiĝo.

Artikoloj: Akre politiktendencajn artikolojn, per kiuj la verkistoj ofendas siajn proksimulojn, aŭ aliajn naciojn, ni devas rifuzi en la intereso de T.E.J.O. Tamen la rubriko „Ĉu ne? ... ” staras je dispono de ĉiuj anoj.

Artikolojn ni ne konservas kaj ne povas resendi. Se iu tamen deziras la resendon de sia artikolo, aŭ ŝatas ricevi respondon, bonvolu aldoni afrankan poŝtmarkon (respondkuponon).

Redakcio: Atentu, ke la redakcia adreso ŝanĝiĝis. Sendu viajn artikolojn al Markt 64, Geleen (L.), Nederlando.

KONGRESA REGULARO DE T.E.J.O.

Programo:

- § 1. Dum la kongreso okazas la jenaj oficialaj kunsidoj:
 - a. malfermo
 - b. ĝenerala kunsido, kies tagordon difinas la estraro,
 - c. aliaj kunsidoj, rekte organizataj de la estraro,
 - ĉ. fermo.
- § 2. La L.K.K. starigas la kongresprogramon:
 - a. pri la sub § 1a nomitaj kunvenoj en kunlaboro kun la estraro,
 - b. rilate al aliaj kunvenoj kaj aranĝoj laŭ la propra iniciato.La kongresprogramo devas esti aprokata de la estraro.

Financoj:

- § 3. La kongresbuĝeto devas esti aprokata de la estraro, kiu kontrolas ĝian korektan plenumon.
Proponoj por la buĝeto estu antaŭ la 1a de januaro en la sekretariejo.
- § 4. La saldo de la I.J.K. venas en la kason de T.E.J.O.
- § 5. La L.K.K. elektas el sia mezo kongreskasiston. Li respondecas pri la financa parto kaj zorgas, ke li, por ĉiu elspezo antaŭ, dum, aŭ post la kongreso, ricevu kvitanckuponon.
- § 6. La kongreskason la estraro kontrolas plej malfrue du monatojn post la finiĝo de la kongreso.
- § 7. La kasraporto publikiĝos dum la venonta kongreso, aŭ antaŭe.

HELPO AL GEJUNULOJ EN NEPAGIPOVAJ LANDOJ.

Tre ofte ricevas la sekretario dezirojn de personoj el nepagipovaj landoj (ekz. Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Hungario, Polio, Orient-Germanio) aliĝi al T.E.J.O.

Je nia bedaŭro ni ĉiam devis sciigi, ke aliĝo por ili ne eblas. Krome ni devis antaŭ kelkaj jaroj eksigi multajn geamikojn en la koncernaj landoj.

TAMEN EKZISTAS MANIERO HELPI ILIN!

Inter vi estas multaj, kiuj post legado de L.J.V., ĝin ne plu bezonas. Al tiuj ni petas sendi iliajn adresojn al la sekretario (S-ro T. Kanter, Lombokstr. 2, Leeuwarden, Ned.); poste vi ricevos sciigon al kiu orienteŭropa amiko vi sendu vian legitan L.J.V.-on.

Ni anticipe dankas vin pro via frata kunlaboro.

F. H. Kat,
Helpsekretario T.E.J.O.
Korespondadreso:
Lombokstr. 2.
LEEWARDEN.

PERANTOJ KAJ KOTIZOJ DE T.E.J.O.

Aŭstralio:	Fr. Halls, 59 Nepean Highway, Elsternwick S 4. Melbourne	ŝ.	Asp. 5.—	Akt.-Subt. ŝ.	7.—
Aŭstrujo:	Alois Hilkersberger, Landeck, Lötzweg 1. Tirol; poŝtspark. 195356	ŝ.	14.—	ŝ.	20.—
Belgujo:	Ph. Cullus, 13. rue Chopin, An- derlecht—Bruxelles; ĝironro 806765	fr.	27.—	fr.	40.—
Brazilo:		Cr \$	10.—	Cr \$	15.—
Britujo:	F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales	ŝ.	4.—	ŝ.	6.—
Danujo:	Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, Brønshøj, ĝironro 73478 ...	Kr.	4.—	Kr.	6.—
Finnujo:	Eld. Vilho Setälä, Onentie 23 Helsinki-kä	Fmk.	175.—	Fmk.	265.—
Francujo:	Dan. Luez, Lycée, Laon (Ais- ne)	Fr.	190.—	Fr.	280.—
Germanujo:	Rolf Brune, (21b) Dortmund, Märkischestr. 184	Dm.	2.25	Dm.	3.50
Hispanujo:	M. Montserrat, Strato Proven- za 75, Barcelona	Pes.	20.—	Pes.	30.—
Italujo:	Prof. A. Camuffo, 4. Bart. d'Alviano, Trieste 420	L.	335.—	L.	500.—
Jugoslavujo:	Kralj Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana	Din.	27.—	Din.	40.—

Maroko:	Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba I. Marrakech, ĝiro- nro Rabat c/ c. 368.92	Fr.	190.—	Fr.	280.—
Nederlando:	G. de Vries, Pav.AB, R.P.I. Bosdijk 771, Eindhoven, ĝi- ronro 537168	f	2.—	f	3.—
Norvegujo:	Eldonejo Esperanto A. E. Boks 942. Oslo	Kr.	4.—	Kr.	6.—
Polujo:	Benedict Palczinsky, Reda k. Gdynia	Zly	2.10	Zly	3.20
Svedujo:	Esperanto-Förlagsföreningen, Box 19071, Stockholm 19 ...	Kr.	2.75	Kr.	4.10
Svisujo:	Sro R. Keller, Kleinalbis 59, Zürich 45	Fr.	2.30	Fr.	3.45
Usono:	E.A.N.A. 114. West 16th. Str. New York 11. N.Y.	\$	0.60	\$	1.—

Familianoj povas pagi duonan kotizon.

Uzu vian libro-servon, tiel subtenante la organizon.

SOCIETO de AŬSTRIAJ ESPERANTO-INSTRUISTOJ (Sekcio de AEF) Vieno, 15., Fünfhausgasse 16.

Al la landa ESPERANTO-organizo (federacio, societo, ligo, instruista grupo).

La societo de Aŭstrijaj ESPERANTO-Instruistoj" konsideras ankaŭ la „Ruĝan Krucon", „precipe la Junularan Ruĝan Krucon" kiel la plej taŭgan propagandkampon por la disvastigo de nia internacia helplingvo ESPERANTO.

Jam en la antaŭmilita tempo, la 7-an de Aprilo 1921, estis akceptita dum la 10-a internacia konferenco de la Ruĝa Kruco en Genevo jena rezolucio (laŭvorta): „Konstatinte la fakton, ke la lingva malfacilaĵo multmaniere malhelpas la realigon de l'internacia idealo de la Ruĝa Kruco, ĉu por savhelpo sur batalkampoj, ĉu inter militkaptitoj aŭ eĉ en la kongresoj de la Ruĝa Kruco, la 10-a konferenco instigas ĉiujn ruĝkrucajn organizaĵojn, ke ili disvastigu la lernadon de la helplingvo ESPERANTO inter siaj anoj, kaj speciale ĉe ju-

nulaj sekcioj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj al internacia kompreniĝo kaj kunlaborado laŭ la celo de la Ruĝa Kruco".

Nia societo jam en la pasinta jaro transdonis - okaze de la jarkunveno de la „Junulara Ruĝa Kruco" en Genevo - proponon enkonduki ESPERANTON en la junularaj grupoj.

Bedaŭrinde nia propono en la ĵus menciita kunveno ne povis esti pri-traktata, ĉar ni iom malfruis kun la alsendo de la propono kaj la programo de tiu kunveno estis jam fiksita, krome ni estis la solaj proponantoj.

La argumentoj por nia propono estas jenaj:

1e. Plifaciligado de la interrilatoj de la eksterlandaj grupoj skribe kaj precipe buŝe okaze de internaciaj kunvenoj de la ruĝkruca junularo.

2e. Ĉar en ĉiuj lernejklasoj ekzis-

tas grupoj de „Junulara Ruĝa Kruco”, kiuj nur tre malfacile interrilatas kun la samspecaj eksterlandaj grupoj pere de naciaj lingvoj, nia internacia lingvo treege plifaciligus la tre necesan interkomprenigon. (Nia societo jam realigis tiun ideon en kelkaj kursoj.)

3e. Ne estas necese mencii, ke ESPERANTO estas facile lernebla kaj elprofunde akcelas ĉiujn kulturajn aferojn, kio ankaŭ tre multe kontribuas por la efektivigo de la sopirita mondpaco.

La supre nomita societo direktas al vi la peton, ke ankaŭ vi **tuj** verku petskribon enhavantan la proponon koncerne la enkondukon de ESPERANTO en ĉiuj landaj Junularaj Kruc-grupoj. Tiu petskribo

okazu jam baldaŭ, por ke ĝi venu ĝustatempe jam fine de Oktobro al la centra oficejo de la „Junulara Ruĝa Kruco” en Genevo (Svisujo), 26. Avenue Beau - Sejour.

Bonvolu atentigi vian landan centron de la Junulara Ruĝa Kruco” pri la akcelo de via skriba instigo, kaj montru per ekzemploj la gravecon de la rilatoj inter la Junularaj organizoj per uzo de nia internacia lingvo.

Atendante vian urĝan subtenon en nia klopodo salutas samideane por la „Societo de Aŭstria Esperanto Instruistoj (Sekcio da AEF)”:

Leopold Gschanes, m.p.
Sekretario de. societo d. A. E. I.

Dir. Franz Menacher, m.p.
Estro de la societo d. A. E. I.
Vieno, la 20-an de Septembro 1952.

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



ĈU VI JAM ESTIS EN PARADIZO?

La titolo de tiu ĉi artikolo ŝajnas esti nekredebla; sed estas vere, ke sur nia terglobo ekzistas vera paradizo. Ĉu vi ne scias tion? Ĉu vi ne kredas tion?

En Eŭropo estas malgranda lando. Ĝia nomo estas Ĉeĥoslovakio. En ĝia parto, Ĉeĥlando, nordokcidente, troviĝas inter urboj Turnov kaj Jiĉin, regiono, nomata pro siaj naturbelecoj „Ĉeĥa paradizo”.

Profundaj arbaroj kaŝas grandajn sablorokojn de diversaj formoj (ŝtonurbo, diabla mano, k.t.p.).

Sur ili staras kasteloj, atestantoj de malnova ĉeĥa gloro.

La granda rivero Jizera trafluas la regionon. Larĝaj herbejoj,

grandaj fiŝ-lagetoj kaj belaj vilaĝoj kompletigas karakteron de la pejzaĝo.

La Ĉehan paradizon ornamas longa masivo de montaro. Plej altaj montoj estas Jeŝted (1010 m) kaj Kozákov (743 m). Ĉi tie oni trovas la konatajn ĉeĥajn gemojn: agatojn, ametistojn, kalcedonojn. En Turnov oni facetas, poluras kaj pretigas ilin en mondkonatajn juvelojn.

Nia pejzaĝo estas vere bela kaj efektiva Ĉeĥa paradizo.

Venu al ni kaj konvinku vin. Vi estos ĉe ni certe, esperante bonvenigataj.

Alois Bobek,
Turnov (Ĉeĥoslovakio).

Nota de la redakcio:

Ankaŭ en alia parto de Ĉeĥoslovakio, en Slovakio, estas tre bela regiono, kiun oni nomas „la slovaka paradizo”.

LA DIABLA-MANO.

En nia regiono estas multaj rokoj. Inter ili troviĝas la roko, nomata „Diabla mano”. Pri ĝi oni rakontas:

En la malnova tempo loĝis en nia regiono malriĉa, seninfana familio. La viro kaj la virino laboris ĉe la terkulturistoj, ke ili povu vivi. Iun tagon kolektis la malriĉa viro foliaron en la arbaro. Li metis ĝin en sakon. Subite aperis antaŭ li ĉasisto, kiu diris al li:

„Mi scias vian mizeron. Mi helpos vin, sed sub unu kondiĉo. Vi donos al mi, kion vi ĝuste havas hejme.”

La malriĉulo ridetis kaj konsentis. Li ne sciis, ke la ĉasisto estas diablo.

„Mi povas promesi, ĉar mi havas nenion hejme”, li respondis al la diablo.

„Post dudek jaroj mi revenos”, diris la ĉasisto kaj adiaŭis la malriĉan viron.

Kiam la malriĉulo venis hejmen, trovis en la lito ĵus naskitan fileton.

Li rememoris nun la vortojn de la ĉasisto kaj malgajiĝis. Post 20 jaroj la diablo revenos kaj forportos la filon.

La filo kreskis. Li studis bone kaj li fariĝis pastro. Kiam li estis dudek jara, li preĝis en preĝejo. Ekstere ekfuriozis ŝtormo. La tre kolera diablo flugis ĉirkaŭ la preĝejo. Sed li ne kuraĝis eniri. Per sia mano li frapis la rokon kaj malaperis — ĉar li malvenkis.

De post tiam oni nomas la rokon „Diabla mano”.

Instruas: Sro A. Bobek.

Emil Hejduk (3a klaso)
Turnov, Ĉeĥoslovakio.

LA BAROMETRA HIRUDO.

Ne nur la rano, ankaŭ la hirudo povas utili kiel barometro. Jen tiel: Prenu vitran bokalon. Ĝi povu enhavi 60 kubajn centimetrojn da akvo. Plenu ĝin ĝis $\frac{3}{4}$, enmetu hirudon. Fermu la bokalon per blanka tolo.

Kiam la hirudo restas ĉe la fundo: daŭros la bela vetero.

La hirudo leviĝas ĝis la supraĵo: pluvos la tutan tagon.

La hirudo ne ĉesas moviĝi: la vento blovos forte.

La hirudo gluiĝas al la aperturo de la bokalo: pluvos, neĝos.

La hirudo sin faldas ĉe la fundo: frostos.

Ĉu vi ne kredas? Kontrolu mem.

Jean-Noël Pottier, 18 j.

ĈU EBLAS?

Remi estas trijara bubo. Li ne volas manĝi sian matenmanĝon. Lia paĉjo diras al li:

- Kial vi ne manĝas?
- Mi satas kaj havas troe, respondas Remi.
- Tamen manĝu iom, diras la patro, vi lasos kiom vi ne povas manĝi.
- Sed mi ne povas, rifuzas Remi manĝi, ĉar ĝuste tio estas supre.



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreso.

Anglujo: 14 knabinoj (12-14 j.) dez.kor.kun samaĝuliĝoj el ĉiuj landoj (krom Francujo). S-ino M. Kennedy, Girl's Grammar School, Bishop Auckland, Co Durham.

Bulgarujo: Janĉo Petrov kaj Zlatko Markov, Str. „Kliment Ohridski” 26, BURGAS, dez. kun la tuta mondo interŝ. pk. gazetojn, fotojn, librojn k aliajn obj. dez. kor. pri lingvo- kaj naturscioj.

Ĉeĥoslovakujo: Fr. Rozsypálek, librobindisto, Dyjakovice 6. II. okr. Mikulov, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Jaroslav Pokorny, 18-jara studento, dez. kor. kaj interŝ. pm. kaj pk. kun ĉiulandaj gekorespondantoj. Skribu al Riegrova, 299, Ŝvermov I. u Klandna.

Nederlando: Gelernantoj (16-20 j.) de por-instruista seminario dez. kor. kun gestudentoj el Okcident-Eŭropo. Skribu al S-ino I. Koopmans-Nauta, UTRECHT-Tuindorp, Schimmelpennincklaan 9.

ANONCTARIFOJ POR L.J.V.

Por anoj: po linio, laŭ la tuta larĝo de la paĝo f 0.75 (aŭ egalvaloro)
" " " " duona " " " " f 0.40 (" ")
Enkadrigita: f 0.50 pli, ol ordinara tarifo.

Por ne-anoj: po linio, laŭ la tuta larĝo de la paĝo f 1.— (aŭ egalvaloro)
po linio, laŭ la duona larĝo de la paĝo f 0.60 (aŭ egalvaloro)
Enkadrigata f 0.75 pli, ol ordinara tarifo.

Sendu la tekston por la anonco al: LA REDAKCIO de L.J.V. Markt 64, Geleen.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Adreso: Oostduinlaan 32,
Hago, Nederlando.

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO (N-ro 19 — Julio 1952)

OFICIALIGO DE LA SUFIKSO -END

Post pristudo kaj voĉdonado la Akademio decidis oficialigi la sufikson *-end'* kun la difino:

„kiu devas esti -ata pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata -i”.

ELEKTOJ POR LA AKADEMIO

En 1952 okazos elektoj kaj rebaloj por 19 postenoj en la Akademio.

Laŭ artikolo 8 de la Statuto kandidatoj povas esti proponataj de ĉiu Esperantista organizaĵo kaj de ĉiu unuopa Esperantisto, kiu ankaŭ povas proponi sin mem.

Eventualajn proponojn oni bonvolu sendi al la adreso de la Akademio antaŭ la fino de Septembro 1952.

Ir. J. R. G. ISBRUCKER
Prezidanto.